



# PILO-PRESS

Interncia Inform servo

Jarabono 1973

20,-- GM

P&K. Nürnberg

819 56-851

\*\*\*\*\*

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 2

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 41/72 - 19 dec 1972  
Aperas ĉiusemajne

## Katamaranem do Francji



### Per boato al Parizo

Varsovio (PR-md). Jacek Kwiatkowski, pola eksmaristo, ĵus - en oktobro - finis la vojaĝon tra polaj riveroj per katamarano kun E-lingva slogantabulo "Pacon al niaj infanoj" (vidu la foton maldekstre -el pola gazeto-). Printempe en la 1973-a jaro li ekveturos per enlandaj akvovojoj el Pollando tra GDR kaj GFR al Parizo. Kune kun li vojaĝos pola kanzonisto, Czesław Niemen, kiu dumvoje senhonorarie koncertos por porinfana fonduso. Pola Radio kelkfoje jam raportis pri la akvovojaĝoj de J. K.

### MODELA EKSPozICIO

Kiel Pilo-Press siatémpe raportis, okaze de la fervojista kongreso en Clervaux s-ro Kurt Jentsch el Ober Ramstadt montris modelan Esperanto-ekspozicion (vidu la dekstran bildon!)

### UEA-estrarkunsido

Rotterdam (wb) De la 29 ĝis 30 dec 1972 okazos estrarkunsido de UEA, tielnomata "teknika kunsido". Kontraŭe al normalaj kunsidoj ĉi tiu nur partoprenas estraranoj loĝantaj ne tro malproksime de Rotterdam. Ĉefaj diskutpunktoj estas la Beograda kongreso kaj la tria baza laborplano.

\*\*\*\*\*

Gojigajn festotagojn deziras al siaj legantoj, abonantoj, klientoj kaj kunlaborantoj Pilo-Press kaj Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg

\*\*\*\*\*



Zamenhof-festoj

Munkeno (PP) Pli ol 50 esperantistoj kolektiĝis en la restoracio =Europäischer Hof=, konata kunvenejo okaze de la Olimpiaj Ludoj, dimanĉe, la 17 dec. Kiel gastoj partoprenis du ĉarmaj junaj japaninoj, dumtempe restantaj en Munkeno, Yoko Seki kaj Yosuko Mizutani, kaj Franz Knoflach el Sudtirolo. Horst Spirat, la prezidanto de la grupo munkena, parolis pri la laboro 1972, pri kies rezultoj li mem ne estis kontenta. Li speciale akcentis la agadonde internacia teamo okaze de la Olimpiaj Ludoj. Salutojn de GEA transdonis Hermann Schmid, Augsburg, kaj Ludwig Pickel parolis pri varba kaj informa laboro. Dum la cetera tempo la ĉeestantoj diligente konversaciis en Esperanto, rigardis la ampleksan librostandon kaj elaçetis la riĉenhavan tombolon.

Pliaj Zamenhof-festoj okazis en Hamburgo (15.12.) kaj en Hanovro (12.12.), kie oni ankaŭ vendis Esperanto-librojn. Dum Zamenhof-festo en Stuttgart, sabate, 16.12., parolis pastoro Adolf Burkhardt.

\*\*\*\*\*

"JUNA AMIKO" sin ofertas

Jus aperis provnumero de internacia lerneja Esperanto-revuo sub la nomo "juna amiko", eldonita de Hungara Esperanto-Asocio. La revuo turnas sin unuavice al lernantoj kaj instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ taŭga legaĵo por komencantoj.

El la enhavo de la provnumero:

- Kolombo de Paco; Islando lando de kontrastoj;
- Benaŝ la ansero; La muziko estas ĉies propraĵo;
- Blinda aglo, laŭ la rakonto de B. Jemeljanov k.a.

Krome enestas versaĵoj, enigmoj kaj rubriko "Interesaĵoj"

La provnumero enhavas 24 paĝojn, formato 14,2 x 20,4 cm, la preso estas dukolora. El la enkondukaj vortoj de la redakcio ni citas: "Tiu ĉi revuo estas por vi, kaj dependas de vi! Tra-legu la prov-numeron, diru vian opinion, kaj skribu al la redaktisto: kio plaĉis al vi, kaj kio mankas en la revuo. Ni klopodas pli-bonigi la enhavon, laŭ viaj proponoj. Se la revuo kaptis vian intereson, se vi trovas ĝin utila, nepre aboniu kaj abonigu ĝin! Ni deziras aperigi la revuon regule, kaj levi ĝian nivelon senĉese; sed por tio ni bezonas subtenon, nome: vastan legantaron."

La prezo por la provnumero estas -,70 GM + -,30 GM por afranko, do 1,- GM la unuopa ekzemplero.

- 5 ekz. kostas 3,50 GM + -,40 GM afranko = 3,90 GM
- 10 ekz. kostas 7,- GM + -,70 GM afranko = 7,70 GM
- 20 ekz. kostas 14,- GM + 1,10 GM afranko = 15,10 GM
- 50 ekz. kostas 32,50 GM + 2,- GM afranko = 34,50 GM

Laŭ interkonsento kun AGEI kaj ILEI oni povas mendi la provnumeron ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113. Mendu per pago al Ludwig Pickel, Nürnberg, P&K. Nürnberg 2144 96-855. La revuo estos havebla komence de januaro 1973, sed mendu jam nun!

Novaĵoj el Francio (LGx)

Zamenhof-strato. La urba konsilantaro de CROIX decidis nomi straton laŭ d-ro Zamenhof en la industria centro de Roubaix-Tourcoing. La inaŭguro okazos la 25 mar 1973, samtempe kun landlima Esperanto-renkontiĝo.

Ambasadora prelego. Traduko de la prelego de R. Harry pri la utileco de Esperanto por diplomatoj (Germana Esperanto-Revuo 4/1972) aperis tutece en la franca gazeto LE PONTIS-SALIEN (n-ro 43).

Oomoto. La dumonata restado en Francio de J. Umeda kaj M. Sawada, fakuloj el Oomoto-centro, Kameoka, Japanio, provokis aperigon de multaj artikoloj pri la Skolo de Onasiburo kaj pri Esperanto en Azio.

Junularo kaj Kopernik. En kvin nordfrancaj urboj oni intencas prezenti infan-desegnaĵojn el la tuta mondo pri la temo "Kopernik kaj astronomio". Kontribuojn sendu al S-ro I. Flaczynski, 29 Rue Mitry, F-62150 Houdain, antaŭ la 28 feb 73.

\*\*\*\*\*

Multekosta Babilono

Kolonjo. Sub la titolo "Multekosta Babilono" la informilo de Germana Industria Instituto (Unternehmerbrief des Deutschen Industrieinstituts) traktis ankaŭ la lingvan aspekton de la pli granda eŭropa komunumo. En n-ro 41/ 12 okt 72 oni skribis i.a.: "Sole la babilona lingva ĥaoso, kiu ekostos pro la plialtigo de la nombro de oficialaj lingvoj de ĝis nun 4 al 7, donacos al la interpretistoj kaj tradukistoj de Bruselo konsiderindan plilaboron....." En letero al la redakcio de la 20 okt 72 Uwe Joachim Moritz, prezidanto de AGEI, landa sekcio NRW, komentis tiun citaĵon kaj proponis kiel alternativon Esperanton. La letero aperis en iomete mallongigita formo en la sama informilo, n-ro 47/ dela 23 nov 72, sub la titolo: "Alternativo por 'multekosta Babilono'?"

Bonan tagon al parlamenta prezidantino

Bonn (PP) Annemarie Renger, membrino de la federacia parlamento, pri kiu Pilo-Press siatempe raportis, estis elektita prezidantino de Bundestag. Ŝi estas la unua virino, kiu tenas tian altan oficon. Kiel ni jam informis, la patro de la nova prezidantino estis fervora esperantisto en Saksujo dum la dudekaj jaroj. Ŝi mem almenaŭ memoras la esprimon "Bonan tagon!"

Vigla agado en Neustadt

Neustadt/Weinstr. (WK) La 16 dec 1972 komenciĝis en la instruĉambro de la Germana Fervojo nova Esperanto-kurso, organizata de la Junulara Grupo de la Sindikato de la Fervojistoj en Germanujo (GdED) kadre de BSW Karlsruhe. - La Esperanto-Centro Neustadt regule dissendas al instruistoj, lernejoj kaj aliaj instancoj informojn pri Esperanto, i.a. ankaŭ la germanlingvan informilon "Esperanto aktuell".

\*\*\*\*\*

Ĉu vi ŝatas ricevi "Pilo-Press" ankaŭ en la jaro 1973?  
Se jes, bonvolu nun pagi vian abonkotizon de 20,- GM! Dankon!

### Naskiĝtagaj jubileo

TEO JUNG, Scheveningen, Nederlando, la fondinto kaj pli ol 40-jara redaktoro de HEROLDO DE ESPERANTO farigis 80-jara la 21 dec 1972.

WALTHER GSCHIEDL, Crailsheim, industriisto, festos sian 70-an naskiĝtagon la 25 dec 72. Dum multaj jaroj la jubileulo kune kun sia mortinta edzino Hedi Gscheidel-Pauli akcelis Esperanton laŭ diversa maniero. Li sukcese kunagis en la Esperanto-Rondo Crailsheim kaj por la "Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio".

Sincerajn gratulojn al ambaŭ jubileuloj!

### Nova japan-germana paro

Zweibrücken (PP) La 23 dec 1972, je la 14a horo, okazos en la preĝejo Alexanderskirche, Zweibrücken, la geedza ceremonio inter f-ino Takajo Muraiŝi, Tokio, kaj s-ro Oliver Walz, konata Esperanto-aganto, Zweibrücken.

Korajn bondezirojn al la nova internacia Esperanto-paro!

### La Semajno en la Radio

Varsovio. Bedaŭrinde la posttagmeza aŭskultado al Varsovio pro ĝenoj ne ĉiam funkcias. Generale la unua parto estas kaptebla, poste la stacio malaperas. Tiele okazis ankaŭ en Munkeno, 17.12.72, 16,30 h. La Panoramo de internaciaj eventoj estis bone aŭdebla, sed kiam la Esperanto-ekspreso komenciĝis, la elsendo ne plu estis aŭdebla. - La matena programo generale estas bone aŭdebla sur 200 m. Tiel ankaŭ la lunda Esperanto-Ekspreso, kiu komete nekutime komenciĝis, nome per varba informo pri pola lino kaj polaj linaĵoj. Jen propono por kristnaskaj donacoj. Cetere tiaj varbaj elsendoj estas disaŭdigataj jam de kelka tempo. Do, Esperanto ne nur en la sporto, en la turismo ktp., sed ankaŭ Esperanto en la komerco! La Ekspreso prezentis du inter-vjuojn, unu kun la rektoro de la Toruna universitato, la alia kun esperantisto el GDR. Kaj kantis Andrzej Tomecki, la Varsovia Esperanto-trubadoro! - En eleganta lingvaĵo Jerzy Grum felietonis la 13 dec pri pola futbalo aŭ piedpilko. Jen nur kelkaj esprimoj: ŝotkapablo, ŝotisto, avanulo, atako, defendo.... Futbalisto alternis kun pilkisto, futbalo kun piedpilko. Sendube Jerzy Grum, la "honora bavaro", estas la unua, la plej kapabla sportkomentisto en Esperanto- La laboro de la Sejmo, Helsinki kaj la problemo de integrigado estis pliaj temoj.

Zagrebo. La jugoslaviaj novaĵoj informis pri la parolado de Tito antaŭ sloveniaj aktivistoj pri internaj problemoj. La radia artikolo temis pri Amatorismo, "la necesa sola fajrujo por kreaĵ ideoj". Krome ni eksciis, ke la 16 dec okazis eksterordinara Esperanto-Kunveno en Jugoslavio. La programo de la 21 dec 72 raportos pri la Zamenhofa festo en Zagrebo. - Berno. Ges-roj Gacond daŭrigis siajn leterkestajn respondojn kaj d-ro A. Baur prelegis pri la svisa verkisto kaj profesoro Robert Faesi, 89-jara mortinta en Zürich. - Pekino detale raportis pri la restado de gvinea delegacio en Ĉinio kaj pri akvorezervujo. - Romo ankaŭ survoje inter Munkeno kaj Nürnberg ne estis kaptebla. En Frankfurt ŝajne la aŭskultebleco estas pli bona laŭ informo de leganto.